

Esperanto-Brno

Esperanto-Brno - Informoj pri Brno - Gravuloj

Robert Musil kaj Alois Musil

Miroslav Malovec

Aŭstra verkisto Robert Musil (1880-1942) kaj ĉeĥa arabisto Alois Musil (1868-1944) ne havis la saman familian nomon hazarde. Ili efektive estis parencoj, kvankam ĉiu el ili apartenas al alia nacio. Robert en nia urbo studis, Alois devenas de la proksima urbo Vyškov.



Robert Musil estas komparata kun Marcel Proust kaj James Joyce pro sia nefinita romano **Homo sen ecoj**, sed eble pli fama li estas pro sia debuta romano **Konfuziĝoj de lernanto Törless**, en kiuj li priskribis siajn knabajn travivaĵojn el kadeta lernejo en Hranice na Moravě. La romano estis sukcese filmita en 1966 kun tiam 15-jara Mathieu Carrière, posta glora aktoro.

Robert Musil naskiĝis la 6-an de novembro 1880 en la karintia urbo Klagenfurt, grandan parton de sia vivo li travivis en Vieno kaj Berlino. Li mortis kiel elmigrinto en la svisa Ĝenevo la 15-an de aprilo 1942.

Li naskiĝis en familio de inĝeniero kaj profesoro de la Teknika Universitato en Brno, Alfred Musil, kaj lia edzino Hermina. Jam kiel infano li estis izoligema kaj hontema, kio akompanis lin dum la tuta vivo. En la jaro 1891 li komencis studi realgimnazion en Brno, ĉe la Elizabeta avenuo, nun avenuo Hus, do proksime de nia klubejo. Jam en la sekva jaro 1892 li transiris al arma lernejo en Eisenstadt kaj en 1894 al arma lernejo en Hranice na Moravě. Ĉi tie li decidiĝis por la kariero de Inĝeniero. En Jaselká-strato troviĝas lia memortabulo.



En 1897 li ekstudis ĉe Teknika Milit-Akademio (*Technische Militärakademie*) en Vieno, fako maŝin-industrio, post unu jaro li transiris al Teknika Universitato en Brno, kiun li finis post du jaroj per titolo de inĝeniero. Poste li laboris en teknikaj laboratorioj ĉe la universitato en Stuttgart. Ekde 1903, kvankam laborante ĉiam kiel inĝeniero, li studis ankoraŭ filozofion kaj psikologion en Berlino. Tre lin influis la germana filozofo Friedrich Nietzsche kaj la rusa verkisto Fjodor Dostojevskij.

En 1906 aperis lia unua romano **Konfuziĝoj de lernanto Törless** (*Die Verwirrungen des Zöglings Törless*), en kiu li okupiĝis pri ĉikano inter armeaj gimnaziaj studentoj. La romano estis akceptita favore kaj tio decidigis lin fariĝi verkisto. En 1908 li definitive forlasis promesplenan maŝin-industrian karieron (li patentis kromatometron, t.n. „Musil'scher Farbkreisel“), kvankam la inĝeniera kariero povis sekurigi al li sukceson kaj vivtenadon. Li dediĉis sin al verkado, precipe la ĵurnalisma. Ekz. en la Berlina kulturmagazino "Neue Rundschau" aŭ kiel teatra kritikisto.

En 1907 li konatiĝis kun edziniĝinta virino je ses jaroj pli aĝa, Martha Marcovaldi (nask. Heimenn, 1874 - 1949), kiu en 1911 divorcis kaj baldaŭ edziniĝis al Musil kun siaj du infanoj, Anna kaj Gaetan.

Inter 1914 kaj 1918 li batalis en la aŭstria armeo en la Itala fronto. Diference de aliaj verkistoj la milito ne respeguliĝis en lia verkaro. En 1916 li vizitis Pragon kaj konatiĝis kun Franz Kafka.

En 1919-1920 li laboris kiel konsultanto de la aŭstria milita ministerio, ekde 1920 li definitive dediĉis sin al literaturo. En 1924 honorita per Artisma Premio de Vieno, en 1929 per berlina Premio Gerhart Hauptmann.

La intermilitajn jarojn li pasigis alterne en Vieno kaj Berlino, kie li kunvenadis kun Hermann Broch, Elias Canetti, Hugo von Hofmannsthal kaj Thomas Mann. En Vieno li ofte vizitadis salonon de Eugenie Schwarzwald, kiu iĝis modelo por la heroino Diotima en la romano „Homo sen ecoj“. (Ŝi efektive nomiĝas Diotima, ne temas pri esperantlingva traduko.) En 1921 li komencis verki tiun romanon, kies du volumoj estis eldonitaj en 1930. La verko ne alportis la atendatan sukceson, nek socian, nek financon, lia familio troviĝis ĉe la rando de bankrota abismo. En 1932 en Berlino formiĝis societo, kiu klopodis subteni la verkiston per financaj rimedoj. En 1936 lin atakis apopleksio, sed li ne mortis.



Post anekso de Aŭstrio al la Nazia Germanio Musil fuĝis en 1938 al la svisa Zuriko kaj samjare liaj verkoj estis malpermesitaj. Post unu jaro li transloĝiĝis al Ĝenevo, kie li mortis en 1942 ĉe gimnastikado. Lia vidvino disŝutis lian cindron en forlasita ĝardeno. En 1943 ŝi eldonis la nefinitan trian volumon de la romano „Homo sen ecoj“ kaj en 1949 ŝi forpasis en Romo. La romano konsistas el tri partoj, nome *Vojo al la rando de ebleco*, *Miljara regno* kaj *El la postlasaĵo*.

Krom la menciitaj du romanoj **Konfuziĝoj de lernanto Törles** kaj **Homo sen ecoj** li postlasis ankaŭ dramojn **Revemuloj** kaj **Vincenzo aŭ Amikino de gravaj viroj**, multajn rakontojn kaj eseojn. En la ĉeĥa lingvo aperis ambaŭ romanoj, dramo *Revemuloj* kaj kolektoj de liaj rakontoj kaj eseoj. En Esperanto nur rakonto **Muŝkaptilo** en traduko de Ferenc Szilágyi en gazeto Norda Prismo en la jaro 1959. Kvar liaj rakontoj estis filmitaj.

En Klegenfurt troviĝas lia muzeo, el kiu devenas nia lasta bildo. Ankaŭ en la reta Enciklopedio de Brno estas troveblaj pluraj fotoj de li kaj liaj gepatroj.

* * *

Lian ĉeĥan kaj pli aĝan parencon Alois Musil konas ĉeĥaj infanoj el aventuraj romanoj Cedroj ĉe Libanono, Unuafoje en dezerto, Venĝanto, Roka urbo, Filo de dezerto, en kiuj li propagandis la islaman kaj ĝenerale araban kulturon. El artisma vidpunkto la romanoj ne estas kompareblaj kun tiuj de Robert Musil, sed la tutmonda signifo de Alois Musil ne estas en liaj beletraĵoj, sed en verkoj fakaj. Nome li apartenas al grandaj vojaĝistoj, arabistoj kaj bibliistoj.


Alois Musil naskiĝis la 30-an de junio 1868 en Rychtářov apud Vyškov kaj mortis la 12-an de aprilo 1944 en Otryby apud Český Šternberk.



Li studis teologion en Olomouc, en 1891 li fariĝis pastro, en la jaroj 1895-1898 li daŭrigis teologiajn studojn en Jerusalemo kaj Bejruto kaj tiel li komencis interesiĝi pri la araba mondo. Tiutempe li malkovris palacon *Kusejr Amra* kaj verkis pri ĝi latinlingvan duvoluman libron. En kvarvoluma verko li priskribis Jordanion sub titolo *Arabia Petraea*. Malkovro de la dezerta palaco Kusejr Amra en 1898 iĝis sensacia kaj en la jaro 1985 la palaco estis envicigita inter memoraĵojn de Unesko. Ankoraŭ antaŭ la unua mondmilito li entreprenis ekspediciojn al Pa-



lestino, Sirio, Arabio kaj Mezopotamio, faris esplorojn geografiajn, etnografiajn, folklorajn kaj politikajn, kiuj ĝis nun estas gravaj fontoj pri la araba kulturo. Li akiris admirindajn lingvajn sciojn. Li estis komisiita ankaŭ de politikaj taskoj repacigi militantajn tribojn (du el ili nomumis lin sia ŝejko).



Post la unua mondmilito kaj ekesto de Ĉeĥoslovakio li transloĝiĝis al Prago kaj ĉe Karola Universitato fariĝis profesoro de arabistiko. Li kunfondis Orientan Instituton en 1922 kaj apartenis al la unuaj membroj. Li eldonadis iom kurtigitajn ĉeĥlingvajn versiojn de siaj fakaj libroj pri siaj vojaĝoj. Laŭ instigo de prezidento Masaryk li aperigis ankaŭ 11 volumojn de serio **La nuntempa Oriento** (Dnešní Orient) pri la politika kaj ekonomia evoluo en Etiopio, Egipto, Araba Duoninsulo, Irako, Irano, Hindio. Por geknaboj li verkis dudekon da aventuraj romanoj kun klarigoj de islamaj tradicioj.

Alois Musil estis membro de multaj sciencaj societoj tra la mondo, ricevis diversajn honorigojn, estis komparata kun Marco Polo kaj David Livingstone. En Vyškov troviĝas muzeo pri liaj vivo kaj verkaro.

fotoj el Vikipedio